N°20 (38) Junio-Julio 1979.

ISSN 0150-5823

# laŭte!

Bimestriel culturel d'information & d' expression espérantiste
Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. Unu n°: 2FF

Eldonas: Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE
Poŝtkonto: 3 371 74 M Bordeaux

Abono por unu jaro : 12 FF (10 FF por Francio) al la ĉi-apuda pĉk.

# pri vortaroj

Kiam oni volas bone paroli aŭ skribi lingvon, oni bezonas vortarojn. Tamen ĉiam oni devas resti konsciaj pri la danĝereco de tiuj iloj. En la maja numero oni montris per ekzemplo la danĝerecon de dulingva vortaro en la manoj de komencanto. Hodiaŭ mi volas montri la danĝerecon de unulingva vortaro en la manoj de spertulo. Mi prenos ekzemplon: la Plenan Vortaron. Kion mi riproĉas al la Plena Vortaro?

1. la fazeolan principon

Kiam mi estis en la unua klaso de liceo, ni studis la fazeolon, kaj la instruistino diris al ni : "La fazeolo havas la formon de homa reno". En la kvara klaso de la liceo ni studis la homan renon, kaj la instruistino diris al ni : "La homa reno havas la formon de fazeolo". Ĝuste tiel funkcias ĉiu ajn unulingva vort-

aro : vorto estas difinita per alia vorto, kiu siaflanke estas difinita per alia, ktp, kaj, ĉar la vortaro kompreneble ne entenas senfinan nombron da vortoj, oni ĉiam cirkle revenas al la komenco. Ekzemple :
reala : efektive ekzistanta kaj kontrolebla.
efektiva : reale ekzistanta, estanta ne nur ŝajna.
ekzisti : efektive kaj nune esti.
esti : verbo esprimanta la ekziston.
Provu post tio klarigi al skizofreniulino, kio estas la realo !
La fazeola principo ne estas evitebla, ĝi estas elemento de iu ajn vortaro. Pri tio oni povas relegi la paĝojn 9 ĝis 11 de la broŝuro "La veraj interparoloj de Sokrato", kiuj, laŭ mi, entenas bonegan pripensadon pri la eco de lingvo.

2. la malobjektivecon

Ĝin mi pruvos nur per ekzemploj :
bolŝevismo (3°): senmoraleca politika taktiko, sin bazanta sur la jezuita diro, ke la celo pravigas la rimedojn.
Sen komento. Komentu komunisto.
kredi : rigardi ion kiel verdiritan, ne postulante pruvojn, rigardi iun kiel verdireman, ne postulante pruvojn, rigardi ion kiel efektivan (noto : vidu la ĉi-supran difinon de efektiva) aŭ efektiviĝontan, ne postulante pruvon. rigardi iun kiel vere ekzistantan aŭ kiel sanktan, sen pruvoj.

Do, mi nenial povas kredi, ke hodiaŭ estas brila suno en blua ĉielo en Strasburgo : tion mi vidas per miaj propraj okuloj. Kompreneble, se mi vidus tra la fenestro, ke pluvas, mi ne estus konvinkita, ke la ĉielo estas blua. Mi asertas, ke bluas la ĉielo, ĉar pri tio estas pruvo. Konsekvence, mi ne kredas, ke la ĉielo estas blua. Almenaŭ ne laŭ la difino de PV. (Ŝajnas al mi finfine, ke mi estas iom tro logika por esti ateista!).
La aserto "mi kredas nur al tio, kio estas pruvita" estas okulfrapa kontraŭdiro : ekde la momento, kiam oni pruvas tion al vi, tio ne plu estas kredebla. Almenaŭ ne laŭ la difino. Raciistoj bonvolu esprimi sin per alia lingvo ol Esperanto !

Kristo : Nomo donita de la Katolikoj kaj Protestantoj al Jesuo, konsiderata kiel filo de Dio.
Konsekvence :
- membroj de la Societo de Amikoj, membroj, eĉ pastroj de la ortodoksa eklezio rusa, membroj, eĉ pastroj de la ortodoksa eklezio greka, membroj, eĉ pastroj, de iu ajn eklezio ortodoksa, membroj de la kopta eklezio, eĉ monaĥoj, membroj de iu ajn eklezio krom la katolika kaj la protestantaj, ne povas esti nomataj kristanoj.
- iu ajn homo, kiu ne apartenas al organizita eklezio posedanta siajn profesiajn religiulojn ne povas esti nomata kristano.
La dua konsekvenco de tiu difino ŝajnas al mi gravega. Tio signifas nepran konfuzon inter kristanismo kaj klerikismo, kiu antaŭfalsas ĉian ajn debaton pri tio en la lingvo Esperanto.

revolucio : subita perforta ŝanĝo en politika reĝimo de iu lando. Konsekvence :
- ĉar en la prospekto, kiun ĝi verkis en Lekturo, la liberecana frakcio de SAT nomas neperforton inter la elementoj de anarkiismo, tio signifas, ke anarkiistoj ne povas esti revoluciuloj. Aŭ almenaŭ, tion oni ne povas diri en la lingvo difinita de la Plena Vortaro.
- homoj, kiuj asertas, ke revolucio ne povas limiĝi al unu lando, sed nepre devas esti mondskala, ankaŭ ne estas revoluciuloj, almenaŭ ne laŭ PV.

Ĝenerala konsekvenco : se oni volas uzi nur la lingvon difinitan en la Plena Vortaro, diskuto en Esperanto pri marksismo-leninismo, pri trockismo, pri kristanismo, pri anarkiismo, ne povas esti objektiva. Ĉiumomente iu povas alveni kun sia vortaro sub la brako kaj diri : "Vi eraras".

Tio estas grava. Tio, kion mi intencas montri per tiu ĉi artikolo estas, ke lingvo ne estas neŭtrala. Lingvo ne estas ilo por komuniki penson. Lingvo estas la ilo mem, per kiu oni pensas; pro tio lingvo kaj penso ne estas disigeblaj. Mi mem spontane pensas en 3 lingvoj : Esperanto, la franca kaj la germana. Nu, mi ne pensas same en la 3 lingvoj, kaj ofte okazas, ke frazon, kiun mi pensis en la germana, mi malkapablas traduki al la franca (kiu estas mia gepatra lingvo). Tio pensigas al mi, ke malapero de iu ajn lingvo el la homaro estus neriparebla perdo, kaj ke la aserto, ke devas malaperi ĉiuj lingvoj, krom Esperanto, estas barbare imperiista. Lingvo ne estas ilo, ĝi estas la penso mem. Tial, komisii al homo la zorgon difini, reguligi, ktp, lingvon, estas doni al li aŭ ŝi povon pri nia penso mem. Lingvo estas povo. Pri tio esperantistoj, neŭtraluloj aŭ neneŭtraluloj, devas konscii.

Al personoj, kiuj scipovas legi la anglan, mi rekomendas la libron de Orwell : "1984". En la angla eldono, per kiu mi ĝin legis, estas aldona ĉapitro, en kiu Orwell analizas, kia fariĝus la angla lingvo en la socio de 1984. La socio de 1984 uzas anglan lingvon, en kiu la deklaracio pri sendependiĝo de Usono havas nenian signifon. Mi citas : "estus neeble esprimi tion en

la nova lingvo kun la signifo de la originalo. Plej proksime oni povus alveni al resumo de la tuta teksto per la nura vorto "krimpenso". Tuta traduko povus esti nur ideologia traduko, per kiu la vortoj de Jefferson estus ŝanĝitaj al laŭdparolado pri absoluta registaro."

Kion eblas aŭ ne eblas pensi en Esperanto ? Ĉu Esperanto havas ideologion ? Kia estas la influo de la lingvo Esperanto al la menso de homoj, kiuj ĝin uzas ? Jen demandoj politikaj, kiujn nepre devas meti al si mem ĉiuj esperantistoj, anstataŭ komisii ilin al aliaj homoj.

Mi ŝatus, ke okazu debato pri tiu temo.

Jacqueline.

*****************************************************

Patriko :

A M I K E C O

Hodiaŭ
ni nin amis
kaj amoras vespere
ĉu ni amikos
morgaŭ ?

Hieraŭ
ne nin konis
ni, la ĉitagon daŭre
kaj ne konas
ankoraŭ...

Antaŭ
tamen ni kantis
tiam ne nin koninte
ni feliĉontus
preskaŭ!

Baldaŭ
nova eksunos
amikeco matene
sed sciflugos
apenaŭ!

*****************************************************

La red. klaĉas : Pro abundo de materialo la felietono "Tra la mondo per biciklo..." ne aperas en tiu ĉi numero.
Ĝoju la francaj pigruloj! Ili trovos tute franclingvan suplementon. Sed se ili kalkulis pli kun la helpo de ŝtataj aŭtoritatoj, ol kun sia propra strebado, por progresigi esperanton, ilia ĝojo rapide estingiĝos... krom se ili malkovris rimedon por "eduki ministron pri edukado", kompreneble.



# ĈIES TRIBUNO

## L A M I S T E R O D E A T E I S T A P R O P A G A N D O (I)

Ĉar 99 % el la membroj de SAT estas ateistoj, recenzoj pri ateistaj propagandiloj, kiuj aperas ĉe la broŝurservo, kutime estas farataj de ateistoj, kiuj memkompreneble opinias la broŝurojn tute geniaj.
En la kadro de miaj kaprinaĵoj, mi pensis, ke eble povus interesi la ateistajn legantojn de Laŭte la reago de neateista legintino pri la freŝdate aperinta broŝuro "La mistero de nia surtera ekzisto". Ĉar mi riproĉas al ateistoj, ke ili ne volas klarigi al mi, kio estas ateismo, mi sentis min devigata aldoni kelkajn tute personajn konsiderojn pri Dio.

### I. Pri la broŝuro

Ĝi entenas la kutimajn argumentojn de ĉiuj ateistaj broŝuroj, kiujn mi nun konas parkere, kaj la kutimajn difektojn de multaj ateistaj propagandiloj, kiuj ĉiam donas al mi malbonan impreson pri la valoro de ateismo. Tiuj difektoj estas :

A) grandega naiveco

Oftege ateismo ligiĝas kun sciencista ideologio pri la Progreso, kiu estas tiom danĝera, kiom la religiaj ideologioj. Archdeacon skribas, ke li dediĉas sian monon al aviado. Mi esperas por li, ke unu el la flugiloj konstruitaj per lia mono dum li estis verkanta la broŝuron, ne estis ĝuste tiu, kiu transportis la bombon de Hiroŝimo. Principe mi ne fordonas mian monon por konstruigi preĝejojn. Sed, se la katolika helpasocio alvokas al mia monujo por konstrui ŝirmejon por politikaj rifuĝintoj, pli volonte mi donacos por tio, ol por konstruigi psikiatriejon kiel tiu, en kiu Sciencistoj enŝlo-

Noto de la red. : Pro sia longeco tiu ĉi artikolo aperos en pluraj partoj - kun la konsento de la verkintino.

sis min, ligis min al mia lito, venenis min per toksaj medikamentoj kaj elektroŝokis min pro abomeninda krimo : manko de racio en la penso. Kaj se mi havas monon por dediĉi al arto, pli volonte mi donos ĝin al la metia asocio de Nia Sinjorino por ripari la katedralon de Strasburgo, ol al la nacia elektra societo por konstruigi novan reaktoron en Fessenheim, ĉar mi preferas vidi en la alzaca pejzaĝo la preĝejon, kiun donacis al ni la katolika pieco, ol la novstilan templon, kiun donis al ni la ideologio pri Scienca Progreso. Kredi, ke post la morto oni iras al la paradizo jes ja estas naiva sinteno, sed ne pli ol kredi meze de la dua mondmilito, ke la maŝinoj alportos feliĉon al la homaro.

B) <u>maniero argumenti pri la Biblio</u>, kiu memorigas al mi la anekdoton pri la angla turisto kiu, vidante servistinon en gastejo de Calais, konkludas, ke ĉiuj francinoj estas ruĝharaj. Archdeacon trovas en perdita anguleto de la Readmono, kiun kutime konas neniu katoliko, verseton militisman, kaj mi devas kredi pro tio, ke la 1805 paĝoj, el kio konsistas la Biblio en la poŝeldono, pri kiu mi disponas, estas legeblaj nur en kazerno.

Tia maniero argumenti pensigas al mi, ke ateistoj havas manieron legi la Biblion, kiu en la kristanaro de 1979 ekzistas plu nur ĉe la atestantoj de Jehovo. Neniu alia franca kristano plu kredas, ke la Biblio estas unu libro, kiu iam falis el la ĉielo por la informado de la nescianta homaro. Ĉiuj scias, ke la Biblio ne estas libro, sed biblioteko ariganta pli ol 60 plej diversajn verkojn : epopeojn, poemojn, legendojn, romanojn, mirfabelojn, kantojn, proverbojn, ktp. Ĉar preskaŭ neniu el tiuj libroj havas unu aŭtoron, sed ĉar preskaŭ ĉiu estis verkita de diversaj grupoj diverse opiniantaj, ofte dum pluraj jarcentoj, la nombro da dikredantoj, kiuj partoprenis en la verkado de la Biblio estas almenaŭ pluraj centoj.

Mi mem legis preskaŭ la tuton. Ĉar tio postulas jarojn, mi dubas, ĉu ateistoj kutime havas la paciencon legi la 1805 paĝojn, do konkludas, ke ili polemikas pri temo, kiun ili ne konas. En la paĝoj, kiujn mi legis (mankas al mi nur kelkaj dekoj) mi konstatis, ke la Biblio instruas : sanktan militon, militrifuzon, sklavecon, liberigon de la sklavoj, mortpunon, abolicion de la justico, poligamion, monogamion, monaĥecon, putinecon, klerikismon, kontraŭklerikismon, privatan proprie-



Cirkulero de Eki WOITE
An der Kirche 33
D 6115 Münster/Darmstadt

La tre granda plimulto de la E-lernantoj, speciale la junaj, lernas nian lingvon dum iom da tempo kaj poste preskaŭ forgesas Esperanton. La bedaŭrinde malmultaj, kiuj iam uzis la lingvon en internacia kadro, havis avantaĝojn per Esp-o kaj posedas E-amikojn : tiuj ofte restas en la movado. Do, ni devas grandigi la eblojn, ankaŭ por la komencantoj, uzi la internacian lingvon kun alilingvanoj. Junaj lernantoj havas malmulte da mono, sed multe da tempo (ferioj). Do, ni devas organizi longdaŭrajn kaj malmulte kostajn aranĝojn. Tial mi planas la venontan karavanon :

<u>Per biciklo kaj tendo tra orienta Francio</u>

<u>Periodo</u>: 6an/18an de aŭgusto 1979. <u>Aĝo</u>: certe kunvenos kelkaj junuloj inter 12 kaj 16 jaroj. Mi tre esperas, ke ankaŭ multaj pli aĝaj kunvenos, sed mi ĝis nun ne scias kiel granda estas la intereso de la "maljunuloj".

<u>Kostoj</u> : 60 GM por la vojaĝo al Francio kaj reen per trajno.
80 ĝis 120 GM por la 12 tagoj en Francio.

Neklaraj estas ĝis nun jenaj punktoj :

1. La vojo, kiun ni biciklos. Mi volas, ke ĉ. la sama nombro kaj aĝo da francoj kaj germanoj partoprenu. Tio verŝajne ne eblos. Tiam mi volas viziti tiel multe da francoj kiel eblas. Do, ni aranĝos la vojon tiel, ke ni tuŝos multajn.
2. Ĉu iu akompanos per aŭto por la bagaĝo kaj por aranĝi tendlokojn.
3. La tendspeco(j), kiu(j)n ni kunprenos.
4. Pri la nombro da partoprenantoj mi kalkulas pri maksimuma nombro de 15 personoj en unu grupo.

Por ke mi pli bone povu plani la karavanon, mi petas vin, se vi eble povas jesi unu el la venontaj punktoj, baldaŭ respondi jenajn demandojn:

- Mi volas kunbicikli la tutan tempon/kunbicikli ...tagojn.
- El mia grupo eble kunbiciklos ...personoj. Mi povas kunpreni tendon. Priskribo de la tendo/.../.
- Ĉe ni ekzistas tendejo. Mi povas prizorgi alian tendejon.
- Vi povas dormi ĉe ni en domo(j) sur la planko. - Se ni ne biciklos, sed nur kune tendos, tiam partoprenos...personoj.

Rimarkoj/.../ Nomo kaj adreso: ....

(resumis Kribo)

Jen somero... kaj la somerumantoj. Alano sin turnas al ili :

## TURISTOJ !

- Turistoj ! Venu kaj vizitu la mediteranean regionon ! Vi renkontos sunon, grandajn sablobordojn, kaj belajn virinojn. Vi vivos en luksaj domoj aù hoteloj. Ĉiunokte estas spektakloj en teatrejoj, en kinejoj : ĉiam la festo. Vi povos forgesi viajn zorgojn. Eĉ se vi restos nur unu monaton, venu, venu...

Ne estas facila vivi aù amuziĝi en Cannes (*), kiam ni estas sen groŝo en poŝo. Regionaj junuloj konas ĉiutage la problemon. Kion fari kontraù la betono, kiu invadas la maron kaj kamparon por la volupto de tiuj, kiuj havas monon ? Kion fari kontraù la soleco en la urbo, kiam la policistoj ĉiunokte "promenadas" tra la stratoj kaj suspektas pri ĉiuj krimoj tiun, kiu havas longajn harojn kaj nigran bluzon ? La burĝaj turistoj estas bone protektataj. Malantaù la ĝendarmo ili povas trankvile dormi kaj akuzi la junularon pri la dekadenco de nia bela socio, nia bela demokratia socio.

Kial perforto ekzistas ĉe la junuloj ? Estas simple. La riĉa turisto tro laca por piedmarŝi deziras maron ĉe sia domo. Li havas monon, li aĉetas teron, sablon, maron kaj li konstruas domon.

( - Kara amiko, vi havas tie belan domon, ĉu ne ?
- Jes, certe. La laboristoj de mia fabriko bone laboris kaj mi ne tro pagis ilin. Sed vidu ankaù mian novan ŝipon, mi fieras pri ĝi...)

La luksaj hoteloj, la grandaj kaj belaj domoj estas rezervitaj por la riĉaj nordulöj aù aferuloj. Restas nur la malgaja antaùurbo por la regionaj laboristoj kaj junularo. Kiel ne esti perfortulo, kiam ni vidas, ke la turistoj ne respektas nian teron, nian urbon, nian kulturon kaj la homojn, kiuj vivas tie.

La turistoj estas veraj invadantoj. Kiam ili respektos nin, ili estos bonvenaj. Se ne, ne utilas veni. Ni ne bezonas ilin.

Alano

(*) aù aliloke en Sud-Francio.

---

### La junuldomoj en Francio

Policisto estis komisiita esplori kio okazas en la urba junuldomo. Li poste raportas al sia ĉefo.
- Nu, pri kio ili parolas en tiu junuldomo ?
- Ha, ĉefo, nekredeble! Ili ĉiuj estas komunistoj!
- Ĉu vere ? - Jes. Ili pridiskutis la abolon de l'salajreco!
- Ha, strange. Ni mem en nia ĉelo neniam pridiskutis tion.

komunikis : Alano.

Konkludu nun nia poeto, Patriko :

## LABORI !

ĉu labori por manĝi ?
ĉu labori por trinki ?
ĉu labori por vivi ?

Tion konsilas la saĝulo :
Ne vivu por labori
Prefere laboru por vivi !
Tion pretendas la riĉulo :
Laboru por libereco
Libereco labori !
Tion atestas la maljunulo :
Jen la fino de mia vivo
kaj mi ankoraù ne vivis !

labori por gluti...
dum ni jam satas !
labori por drinki...
neniam estas ni sufiĉe ebriaj
por forgesi la laboron !
labori por postvivi...
mortos la malriĉuloj pro malsato
aù pro milito
aù pro stulteco !

Tion blekas la stultulo :
Kial ne labori ?
ĉu eble ne labori ?
Prefere vi laboru !
Tion krias la ribelulo :
Laboru nur por vi mem
kaj kiujn vi amas.

Kiu inventis la laboron,
tiu devus esti
farinta ĝin mem !!

La venonta numero de "Laùte!" aperos fine de aùgusto !

Directeur: Simonet. Imprimeur: Baudé,47340 Laroque. CP:58651

## E N H A V O

`***********`


* Klarigoj - Mallongigoj ... 2
* Adresaro Francio ... 3
Hispanio ...16
Japanio ...16
Nederlando ...16
Svedio ...17
* La perantoj de "Laùte!" ...18
* Grupoj. Asocioj. Eldonantoj ...19


BRESTA RONDO ESPERANTA

`**********************`

- kunvenas ĉiujn unuan kaj trian mardon en "Maison Pour Tous" de l'Harteloire
- rilati kun: P. Chevin, 26 rue Turenne, F 29200 Brest.

SAT-AMIKARO, 67 av.Gambetta, 75020 Paris

`***********`

(Laborista E-Asocio en franclingvaj teritorioj).Libroservo: Schneider,94320 Thiais

`*******************************************`


Supplément au n°19 de "Laùte!" - Majo 1979
Directeur de publication: Simonet. CPPAP 58651
Imprimeur: C.Baudé 47340 Laroque.



ISSN 0150-5823


# ADRESARO

komuna al geesperantistoj abonantaj al "Laùte!" 1979.

`***************************`


Suplemento de "Laùte!" - Majo 1979
Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. 47340 Laroque 1 FF




## Klarigoj

`********`

Por ke la geabonantoj de "Laùte!" povu interkonatiĝi kaj rekte interrilati, "Laùte!" eldonas la Adresaron de siaj geabonantoj, kiuj en ĝi povas informi pri
- sia naskiĝjaro (la du lastaj ciferoj)
- sia profesio
- siaj ŝatokupoj (ŝ:)
- sia preteco gastigi vizitantojn (g:)
- sia preteco instrui E-on (nomo substrekita).

Tiu adresaro estas regule ĝisdatigata en "Laùte!" kaj en ĝi povas informi pri sia afero la abonantaj grupoj aù asocioj.

## Aliaj mallongigoj

`****************`

| | |
|---|---|
| - viro | c. cours |
| + virino | ch. chemin |
| x ge- ; familio | r. rue |
| a. allée | rés. résidence |
| av. avenue | rte route |
| bd. boulevard | * grupo/asocio |

Ĉiujn modifojn kaj aldonojn al tiu ĉi adresaro sendu al : "Laùte!" F 47340 Laroque Timbaut



## F R A N C I O

02400 CHATEAU THIERRY
- Naudé André
31 r. Folie l'Abbé
(11, em.instruisto)

04250 LA MOTTE DU CAIRE
- Jeannot
Ferme Les Brunets

04510 MALLEMOISSON
+ Ruiz, Mirabeau

06130 GRASSE
+ Bariteaud Pauline
33 av.Libération
(11,florkultiv.)

06000 NICE
- Siffre Jean
34 rue Trachel

06300 NICE
+ Luquet Renata
13 r. Caïs Peirlas

07140 LES VANS
x Alibert M. & L.
Thines
(em.instr.)

07000 PRIVAS
+ Bascou Paulette
r.de l'Espéranto

10170 MERY SUR SEINE
- Fort Pierre
Fontaine les Grès

10120 ST ANDRE LES V.
- Peyraut Yves
7 av.A.Gillier

11600 CONQUES SUR ORB.
- Bénit Jean
Rue de la Fontaine
Villegly

13100 AIX
- Jullien Marcel
18 av.H.Pontier

13190 ALLAUCH
- Imeldi Quirin
Trav. Ricard
Logis Neuf

13720 LA BOUILLADISSE
- Pelletier Louis
Parc l'Entrauno 7
(10,makl.)

13005 MARSEILLE
- Raymond E.
9 r. Louis Astruc

13008 MARSEILLE
- Garrigue François
Le Trinidad
63 av.Pointe Rouge

13015 MARSEILLE
- Roux Claude
16 bd. des Pins
Les Borels

16000 ANGOULEME
x Martinez I.& G.
53 r. du Minage

17130 MONTENDRE
- Belin Christian
R.E.S.
Le Favreau - Tugéras

17100 SAINTES
- Manceau J.,Lormont-Haut, Foncouverte
(12,inĝ. kemiindustria konstruado)
t:(46)93 39 80
Perfektiga E-kurso

19100 BRIVE
x Gimbert A. & J.
Imp. G.Aygueparse
- Milon Roger
49 av.Alsace-Lorraine

22500 PAIMPOL
- Guillou S.
Ch.du Terron
Kérity

22380 ST CAST
LE GUILDO
- Péraire A.L.
18 r. de l'Isle

24100 BERGERAC
- Curnier M.
29 r.Beauferrier
(14, instruisto)
t:(53)57 28 75
- Raël Sainte Croix
34 r.JJ.Rousseau

24500 EYMET
- Delalot B.G.
"La Fera Ĉerko"
Rte de Serres

24000 PERIGUEUX
- Gabillat J.L.
7 r.de la Clarté
- Grégoire Jacques
32 r.Paul Dumas
(25,instruisto)
t:(53)08 68 11
ŝ:okcitana movado



24430 RAZAC SUR L ISLE
- Ditacroute Fernand
Rd Point Jean Jaurès
t:(53)54 65 37

25000 BESANCON
x Coulon
2 rue Galilée

26110 NYONS
- Dumont G.
13 rue P.Toesca

26000 VALENCE
- Marin Félix
26 r.Pierre Curie

29200 BREST
- Chevin Patrick
26 r. Turenne

30480 CENDRAS
- Pelletier Rolph
Mas du Rieusset

30740 LE CAILAR
- Angevin Lucien
R. Lazare Bernard

30000 NIMES
- Laval Raymond
13 r.Rabaut StEtienne

31190 AUTERIVE
- Durel René
1 ch.de la Fageolle

31620 FRONTON
- Auberger Marcel
R. Garenne

31240 L UNION
- Savaric F.
20 pl. des Sorbiers
St Jean

31600 MURET
- Cassan Pascal
8 bis,ch.de Louge

31470 ST LYS
- Ricros Jean
6 ch.de Vaysses

31000 TOULOUSE
- Guillemau E.
30 r.Peyrolières
(09, makl.)
+ Lagenès Lea
20 r.Ste Thérèse
- Navarro Félix
Cité Port Garaud
Bât.A, av.Hauriou



31200 TOULOUSE
+ Gaubert L.
13 r.L.Castelbou

31300 TOULOUSE
- Membrado A.
9 r.de la Cerdagne

31400 TOULOUSE
- Pontnau Robert
95 av.J.Julien
- Eychenne Jean
20 r. du Midi

31500 TOULOUSE
- Tchavdaroff Boris
7 r.de l'Avenir

32000 AUCH
+ Cardonne Colette
3 r. d'Etigny
+ Denègre Solange
Ecole Sambre & Meuse
- Lévêque Dominique
2 r. Molière
- Louart Stéphane
1 r. Lamartine
- Palanque Alain
33 bis, r.Michelet
t:(62)05 12 46

32000 AUCH
+ Pérez Rose
194 cité de la Hourre
+ Saint-Martin M.B.
4 r. Anatole-France

32150 CAZAUBON
+ Martin Françoise
C.E.G.

32100 CONDOM
- Sénèque Hervé
42 r. République
La Bouquerie

32200 GIMONT
+ Lajoux Colette
Rte de St Jean
+ Taulet
Ecole de Maurens

32700 LECTOURE
+ Chatelier M.F.
av.Ville de StLouis
x Rosso
Cité Bagatelle 45

32370 MANCIET
- Escoubès A.



32140 MASSEUBE
- Dazun E.
Rte de Ponsan
Montlaur-Bernet

32340 MIRADOUX
- Girard de Pindray
Le Cedassé

32300 MIRANDE
- Despaux L., Viozan
(instr.)

32250 MONTREAL
- Champs Guy
t:(62)28 44 43

32160 PLAISANCE
+ Tajan Théette
66 r. Adour

32400 RISCLE
- Alquier A.
Ecole des Garçons

32450 SARAMON
- Chavarot Henri
"En Soulès",Lartigue

32540 STE CHRISTIE
- Galand Raoul
Roquefort

32310 VALENCE SUR B.
- Bourgeat J.C.
St Puy
(instruisto)

32190 VIC FEZENSAC
- Portau Maurice
Rte de Mouchan

33740 ARES
+ Templier
7 r.Nelson-Barrau

33530 BASSENS
- Chaire Henri
8 r.du Printemps
t: 06 06 49

33000 BORDEAUX
+ Badet Odile
5 c. A.Briand
+ Gottin Maryse
26 passage de l'Hôpital
(52, instruistino)
+ Larchevêque Simone
214 c.de la Marne
+ Lazarus Anny
102 r.Abbé de l'Epée
(52, instruistino)
ŝ:fot,amor,manĝ,
vojaĝ,kin,leg,dorm.
legi bildbendojn.

33000 BORDEAUX
- Septier Laùrenco
102 r.Abbé de l'Epée
(53, fotisto)
ŝ:fot,pol,amor,
epikurajn manĝ.
klas.muziko,kin.

33200 BORDEAUX
+ Gabillon Ginette
32 r. Renault
(30,desegn.prof)
t: 08 50 12
+ Gaillard Simone
27 r. Caillou
(20, em.instr.)
t: 28 08 96

33300 BORDEAUX
+ Campagne Rose
17 r. Edouard
Colonne
(25,instru.)
x Demontoux
2 r.François Lévêque
(19,emer.)
t:(56)29 77 25

33620 CAVIGNAC
- Lajus Joël
Ecole (instr.)

33150 CENON
+ Robert Gaïta
11 r.Frères Lumière
(20, em.instr.)
t:(56) 86 32 80
- Robert Leo
(sama adreso)
(14, em.instru.)
Kor: pôt. al multaj
landoj: Jap,S,NL,
YU, ktp...

33470 GUJAN MESTRAS
- Sevilla P.
108 c.de la Marne
t: 66 00 70

33210 LANGON
+ Bartherote Ch.
Toulenne
(98, emer.)
t: 63 04 13
- Bonnemason Jean
Couloumey II
- Dufourg Henriko
12 r. Jules Ferry
(28,instruisto)
t: 63 23 37
ŝ: tabloteniso



33260 LA TESTE
+ Beglot Y.
11 r.Jean Moulin

33131 LE CANON
+ Chaillot Henriette
5 av.de la Réousse
Dune de l'Herbe

33850 LEOGNAN
- Damarin R.
Le Barbut
t: 89 07 74

33500 LIBOURNE
- Moreau Marcel
50 r.de Bordes
(14,emer.)
t:(56) 51 16 02
ŝ: ĝarden.(floroj k
legomoj, teksado)

33140 PONT DE LA MAYE
- Artigas A.
13 r.Marceille H
Villenave d'Ornon
+ Duverdier
11 r. Courteline
Villenave d'Ornon

33240 ST ANDRE DE CUB.
- Levreaud Roland
18 r. Couraud
t:(56) 43 09 39

33450 ST LOUBES
- Lavergne Michel
"La Garenne",Izon

34500 BEZIERS
+ Castello Denise
25 r. StSimoniens
* Cercle Biterrois
d'Espéranto
9 r. G. Picot

34100 MONTPELLIER
- Ensuque Louis
1 r.de Piboules
+ Hortolan A.
41 av.G.Clemenceau
+ Vierne Y.
5 r. Dr Roux

34120 PEZENAS
- Lang J.C,Montplaisir
Castelnau de Cuers

35000 RENNES
x Esperanto-Klubo
Renna, C. Bertin
4 rès. StJean
Baptiste de la Salle



36200 ARGENTON CREUSE
- Baronnet Félicien
65 r.Croix de
l'Aumay

38400 ST MARTIN
D HERES
- Jacquel A.
61 av.J.Vallès

41600 LAMOTTE BEUVRON
- Loisirs Sains
2 r.des Ecoles
Vouzon

45190 BEAUGENCY
x Ribas F. & A.
56 r.des Querres
t:(38)44 69 18

46000 CAHORS
- Cuquel Roger
209 r Dr Ségala

46100 FIGEAC
- Thon Germain
Rte de Roussilhes

46120 LACAPELLE MAR.
- Delpech André
Le Bourg

46200 SOUILLAC
x Signoret P.
R.de Timbergues

46220 PRAYSSAC
- Ragot Jean
42 La Grèze
(em.instr.)

47000 AGEN
- Benaïm H.
r.Chanoine Marboutin
t: 66 42 47
- Labroille R.
11 r. JS.Bach
Le Passage d'Agen
t: 66 02 54
+ Moreau Klara
87 av.Michelet
t: 66 09 11
- Cnudde Albert
11 r. Sully

47007 AGEN
+ Chassard R.
BP. 195

47700 CASTELJALOUX
- Piqueras
Rte de Marmande



47260 CASTELMORON
+ Laffargue Denise

47320 CLAIRAC
+ Lautard Marie
Rte d'Aiguillon
+ Nussli
Rte de Tonneins
- Simonet Jacques
BP. 9
t: 79 50 23

47500 FUMEL
- Raynal Alain
2 av. Libération
Monsempron

47420 HOUEILLES
- Bezombes Maurice

47340 LAROQUE
- Baudé Christian
Gare (39,fervoj)
t: 95 71 28 (atm)
ŝ:ekol,anark,ĵaz.
g: en Beauville

47200 MARMANDE
+ Mouneyrou Noémie
1 r. Gillet
t: 64 11 67

47200 MARMANDE
+ Vergnac D.
135 bd. Liberté
t: 64 06 13
+ Pech Catherine
7 r. Jasmin

47800 MIRAMONT DE G.
- Boucherie Robert
89 r. du moulin
Toubens
- Pierre Alain
Les Jacqueteaux
Roumagne

47150 MONFLANQUIN
+ Roux G.
Rte de Villeneuve
t: 01 41 43
(13, emer.)
ŝ: muzik,koresp.

47480 PONT DU CASSE
- Chaudurié Jacques
Gare (fervojisto)

47400 TONNEINS
- Gionco JC.
Labarthe,
Villeton

47370 TOURNON D AGEN.
- Andrieu Marius
Lartel,Masquières

47300 VILLENEUVE S LOT
x Bost J.
9 r.Fontanelles
t: 70 32 29
+ Duchamps H.
18 r. Gal. Gouget
(25,poŝtistino)
g: laŭeble, kiam ĉeestas.
t:(58) 70 78 71
+ Nadaud
22 r. Rouget de Lisle
+ Larrue Laure
63 HLM de Marès
x Renaud Etienne
525 r.Tout-y-Croît
t: 70 05 29
- Traversié L.
5 r.des Agriculteurs

47304 VILLENEUVE S LOT
- Lesmarie A.H.
BP. 106

48500 LA CANOURGUE
- Hénin Jean
Rte des Clauzes

48300 LANGOGNE
- Sarrut Robert
Bt.F, Pl.Lachamp

48100 MARVEJOLS
+ Maurin Marcelle
62 l'Empéry

48000 MENDE
- Celiqua Claude
Lycée Technique
av.du 11 novembre

49000 ANGERS
- Montade Ph.
406 rés.Lakanal
Rue Lamarck

54000 NANCY
- Louis Petro
19 r.Sigisbert-Adam

59130 LAMBERSART
- Thumerelle J.C.
3 bis r.de l'Avenir

60400 NOYON
- Grollemund Pierre
94 a. Quennezies
(appt 424)



60400 NOYON
+ Hochedez Laurence
17 a.des Sapins, Bt A.

62740 FOUQUIERES LES LENS
x Bouchez (familio)
66 r. E. Zola
t: (21) 20 32 35
g: ebleco gastigi
- Michel (37,instruisto) instruas E-on en Eŭropo-Domo(Douai),Collège (en Fouquières) - resp. pri Grupo de Socialistaj Esp-istoj de "Fédération Socialiste du Pas-de-Calais).
+ Michèle (39, estrino de elementa lernejo)
ŝ: cikloturismo.
+ Sigrid (63) ŝ:rajdarto.
+ Karyne (64) ŝ: gimnast. astronomio.
- Boris (66) ŝ: ŝakoj(EŜLI) sportoj, foto.
(La tuta familio parolas Esperanton)

64290 GAN
- Seurin J.
Rte de Bouillet
Lasseube

64000 PAU
- Piquette Albert
16 r. Lalo

65290 JUILLAN
- Canavate P.
20 r.des Pyrénées

65000 TARBES
+ Bador Yvonne
3 r. Descartes

66700 ARGELES PLAGE
- Lagoutte Aristide
Le Hameau au soleil
(14,emerito)
E-isto de 1934.
g: senpage unu samideanon aŭ paron en sia eta hejmo dum pluraj tagoj.
t: (68)36 06 11

66700 ARGELES S MER
+ Micoulas Rose
2 r.de la Paix



66700 ARGELES SUR MER
+ Tomasini Carmen
17bis, rte de la Mer

66000 PERPIGNAN
- Bustin Martin
1 r.de la Preste
Tour 3 - 9e étage
- Fernandez Jean
21 r.Henri Matisse

66500 PRADES
- Piedrafita F.
ĉe H.Tarrène
Eus

67000 STRASBOURG
- Girard René
8bis, r.Pontonniers

67100 STRASBOURG
+ Lépeix Jacqueline
82 av.Jean Jaurès
(51,bibliotek.)
Instruas esp-on.
Noto: Ĵaklino intencas forlasi Strasburgon en sept.79,se ŝi povos. Ĝis tiu dato, ŝi povas gastigi paron, kiu ne postulas de ŝi 3-stelan komforton k kiu antaŭsciigas sian alvenon.

73260 AIGUEBLANCHE
- Caudet V.
Les Avanchers
(chef-lieu)

73190 CHALLES LES EAUX
- Sire Serge
80 r.de l'Aviation

73000 CHAMBERY
- Haren Michel
589 av.Gal.Cartier

75017 PARIS
- Magnani Remo
83 r. Lemercier

76160 DARNETAL
- Tercenier Pierre
217 r.de Longpaon

77850 HERICY
+ Buisson Suzanne
15 r.F.Barthélémy

78320 LE MESNIL ST DENIS
- Arroyo Laŭrenco
A.L.T.I. ch.3412
Le Bois de l'Etang
La Verrière



79000 NIORT
- Saurigny André
20 imp. des Bergeronnettes

80000 AMIENS
- Landard Pierre
9 r. d'Antibes

81600 GAILLAC
- Rambouillet Henri
19 r.Denfert-Rochereau

81270 LABASTIDE ROUAIR.
+ Calas Suzanne
27 r. Cathalo

82160 CAYLUS
+ Estrade Lysiane
Mas du Molinié
Cornusson, Parisot

82000 MONTAUBAN
+ Déjean Nicole
14 r. A.France
t: 03 00 25

82400 VALENCE D AGEN
x Debande G.
28 r.G.Esparbès
+ Sarroca Roza
19 r.Chevalier Toile

83700 ST RAPHAEL
x Poupeau
Anthéor
12 bd. Eucalyptus

83210 SOLLIES PONT
x Gieure R. & M.
"Liber"
Ch. Reboeuf
- Mathis A.L.
"La Roumiouve"
Solliès-Ville

87100 LIMOGES
- Despujols R.
96 r.des Tuilières

87350 PANAZOL
- Trémon G.
31 r. Turgot
(23, teknik.prof. pri mekaniko)
t: (55) 30 28 31
ŝ: dez. ricevi specimenojn de E-glumarkoj por internacia katalogo, unika en la mondo.

91430 IGNY
+ Martinez Nereida
50 r.du 4 septembre

92500 RUEIL
- Brilleaud JS.
7 r.Frères Lumière
t: 967 18 67
- Enizan Louis
44 r. Dr Guionis

93250 VILLEMOMBLE
- Grandière Rolando
68 a. de la Tour

94230 CACHAN
- Brunet Laurent
51 av.Div.Leclerc
x Yvon G. kaj Paliot C.
56 r. Marcel Bonnet
ŝ: pac; naturismo
g: 2 pers. maks.

94340 JOINVILLE LE P.
- Lebec Gilbert
10 r. Jean Mermoz

94100 SAINT MAUR
+ Roche Mamette
36 r. du Four

94320 THIAIS
- Schneider Bernard
30 av.République

H I S P A N I O

- Molera Ramon
str. Sta Joaquima 13
MOYA (Barcelona)

- Perez Jesus
Apartado 27066
Barcelona 5

- Puig i Cánovas O.
Güell I Ferrer 223
SABADELL

J A P A N I O

- Mine Yositaka
Kitahama-Kitawaki
29-16
Takasago,Hyogo-ken
671 01

- Jamasaki Motohiro
Sinsyu-daigaku-
syukusya 4-403
1709-5 Wakasato-
minamiiti
Nagano-si 380

N E D E R L A N D O

- De Wit Bert
Leidsevaart 52
2114 AD VOGELENZANG



S V E D I O

- Persson Pelle
Svartviksvägen 14
S 123 52 FARSTA

- Karlsson Henrik
Fimongatan 12
S 590 40 KISA

- Göransson Egon
SLEA-Informilo
Hantverkargatan 15b
S 211 55 MALMÖ

* Laborista E-Klubo
Barnhusgatan 8ög.n.b.
S 111 23 STOKHOLMO

- Coste Guy
Sernandersv. 2/336
S 752 61 UPPSALA

- Wiechowski Miroslaw
Sernandersv. 7/322
S 752 61 UPPSALA

- Lindström Kurt
Jämtlandsg. 152, 7tr
S 162 20 VALLINGBY



**La perantoj de "Laùte!"**

Japanio : MINE Yositaka. (vd.p.16)

Nederlando : Bert DE WIT ,,

Skandinavio : Pelle PERSSON (Svedio) p.17

Regionaj perantoj en Francio :

* Pikardio : Le Radis Noir, BP 11, F 60400 NOYON
* Ĝirondio : Groupe Girondin des Travailleurs Espérantistes
102 rue Abbé de l'Epée, 33000 BORDEAUX
(pĉk: 3 477 71 F Bordeaux)
* Tuluza regiono : Association des travailleurs espérantistes de Toulouse
3 rue de la Cerdagne, 31300 TOULOUSE
(pĉk: 1 419 53 N Toulouse)
* Ĝersio : Cercle amical gersois espérantiste, FALEP, 17 r.Lafayette, 32000 AUCH
(pĉk: 3422 83 N Toulouse)

Landoj aù regionoj, kie ankoraù ne estas peranto : Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut
(pĉk: 3 371 74 M Bordeaux)

Abonkosto : 12 FF (10 FF por Francio)



**G R U P O J**
**A S O C I O J**
**E L D O N A N T O J**

Tie ĉi povas informi pri sia afero la abonantaj grupoj kaj asocioj aù ties abonantaj respondecul(in)oj.

Aĝenia Esperanto-Rondo
**********************

- adreso : Cercle espérantiste de l'Agenais F 47340 Laroque Timbaut
- poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux
- organo: "Laùte!", samaj adreso kaj pĉk., dumonata. Jarabono 12FF (10 FF en Francio)
- grupkotizo: nula. Monsubteno: laùvola.
- libroservo: J.Simonet, BP.9, 47320 Clairac
- ĉiusemajnaj publikaj kursoj en Agen (Maison de l'Europe), Clairac (Junuldomo), Villeneuve sur Lot (Kulturdomo), Monflanquin.
- perkoresponda kurso: G. Roux, Rte de Villeneuve, 47150 Monflanquin (la lernanto pagas nur la lernmaterialon).
- renkontebloj : ĉiutage ĉe la sidejo (gare SNCF, Laroque, t: 957128 (matene); ĉiumonate en la rondkunveno ; ĉiujare, E-semajnoj en "Moulin de Carguessac", 47470 Beauville. En Beauville: ebleco tendumi, tranokti endome. Peti informojn ĉe la sidejo.

Association des travailleurs espérantistes de Toulouse, 3 rue de la Cerdagne,31300 TOULOUSE
***************************************

- poŝtkonto : 1 419 53 N Toulouse
- organo : "Laŭte!"
- sekretario : R. Pontnau, 95 av.J.Julien 31400 Toulouse
- kunvenoj ĉiun kvaran vendredon de l'monato je 21a horo en la Labor-Borso (enirejo : 1 rue Merly)

---

Féd. du Sud-Ouest pour l'Espéranto
*********************************

- adreso: M. Curnier, 29 rue Beauferrier 24100 Bergerac
- poŝtkonto: 4 317 22 G Bordeaux

---

Groupe Girondin des Travailleurs Espérantistes, 102 rue Abbé de l'Epée 33000 Bordeaux
*************************************

- organo: "Laŭte!"
- grupkotizo kun bulteno : 15 FF
- poŝtkonto : 3 477 71 F Bordeaux
- sekretario : J. Lajus, Ecole, 33620 Cavignac - libroservo : ĉe la sidejo.
- kunvenoj ĉiumonataj en diversaj urboj de la departemento (vd. en "Laŭte!").



Ĝersa Amikaro de Geesperantistoj
*********************************

- adreso: Cercle amical gersois espérantiste FALEP, 17 rue Lafayette, 32000 Auch.
- poŝtkonto: 3422 83 N Toulouse
- organo: "Laŭte!"

---

I.C.E.M. ESPERANTO (bulletin trimestriel de la commission Espéranto de l'Institut Coopératif de l'Ecole Moderne)
****************************************

- adreso: ICEM-Espéranto, Saint-Puy 32310 Valence sur Baïse
- kotizo: 50 FF - nura abono: 20 FF
- pĉk: ICEM-Esperanto, Nantes 2224 Z

---

La Kancerkliniko
****************

(politika kaj kultura revuo, aperas kvar fojojn jare).
- abono: 24 FF por 4 sinsekvaj numeroj.
- redaktejo: Laŭrenco Septier, 102 rue Abbé de l'Epée, 33000 Bordeaux.
- pĉk: Ĵak Le Puil, 12 729 73 X Paris
- specimenojn sendas kaj abonojn povas registri ankaŭ la redaktejo.

---



E K O P E R A N T O (bulteno de Ekologia Rondo Esperantista)
****************************************

- adreso: Bert de Wit, Leidsevaart 52 NL 2114 AD Vogelenzang (Nederlando)
- aperas 4-foje jare. Abono: 5 gld.

---

S.A.T. - B R O Ŝ U R S E R V O
*******************************

- adreso: La Juna Penso, F 47340 Laroque
- pĉk: 3 374 04 M Bordeaux (samnome)

Tiu SAT-servo celas etkoste eldoni diversajn manuskriptojn : originalojn kaj tradukojn, elĉerpitajn tekstojn, debatojn, varbilojn.
- abono : sendi aŭ ĝiri minimume 50 FF-provizon. La provizinto ricevas ĉiujn novajn tekstojn ekde la kuranta jaro ĝis elĉerpiĝo de la monprovizo kun rabato 20 %.
- senpaga listo de disponeblaĵoj.

<u>Ĉefaj tekstoj jam eldonitaj</u>

Adamaĵoj (Lanti) - Antropogenezo (Pannekoek) Argentina novelaro (2 kajeroj) - Bazoj de anarkiismo (Balkanski) - La blankaj gardistoj (Heiligstein) - Espéranto de poche - Etiko I (Kropotkin) - Fronte al la vivo (Krishnamurti) - Individuismo en antikveco (Han Ryner) - Individuisma Manlibreto (Han Ryner) - Kontraŭflue (Valo) - Katastrofplano pri la atomcentralo de Fessenheim -



Lingvaj anguloj (Baronnet) - La inĝenia hidalgo Miguel Cervantes (Han Ryner) - La mistero de nia surtera ekzisto(Archdeacon) La migrantoj en Francio nuntempe (De Cazenove) Memvola servuto (La Boétie) - Mia vivo (Bartelmes) - La rajto de pigro (Lafargue) - Politika neperforto (M.A.N.) - Revolucia registaro kaj aliaj tekstoj (Kropotkin) - Du rêve à la réalité : l'espéranto (Masson) Rido sanigas! (Burger) - Sindikatismo, Sovetoj (Pannekoek) - Tabakismo kaj emancipo (Masson) - La triviala homo (Ingenieros) - Tra la mondo per biciklo kaj esperanto (Alfa-Beta) - La veraj interparoloj de Sokrato (Han Ryner) - El verkoj de Lanti - Vortoj de Kamarado E.Lanti -

<u>Elĉerpitaĵoj</u>

Dictionnaire de poche - Initiation à l'esp. - La Kvina Evangelio (Han Ryner) - El la kara infaneco...(Valo), k.a...

<u>Venontaj eldonaĵoj</u>

Esperanto or English ? (nova eldono, Masson) La aperoj de Ahasvero (Han Ryner) - Al la junuloj (Kropotkin) - El verkoj de Tolstoj - La Poemo de Rodano (F.Mistral) - ktp...

---

GRUPOJ, ASOCIOJ, ELDONANTOJ
****************************

Klubo Esperanta Renna (KER)
**************************

4, résid. St Jean-Baptiste de la Salle
F 35000 RENNES.
- t: (99)54 28 42
- Poŝtkonto : 391 45 W RENNES
- cirkulero : franclingva duonjara sendata al ĉiuj membroj.
- grupkotizo: laŭvola sed ne nula.
- libroservo : adreso de la Klubo.
- kursoj: publika, adreso de la Klubo, lunde de la 18a ĝis la 22a. perkoresponda, adreso de la Klubo.
- kunvenoj : la unuan mardon de la monato: je la 18a.
  la trian mardon de la monato : je 20.30 en Club Léo Lagrange, 16 rue Thiers, Rennes.
- eldonoj: dulingvaj (bretone kaj esperante)
- semajnfinaj staĝoj.

La Kritikanto : eldonejo. Adreso de kdo MINE Yositaka (Japanio)
*************

ADRESARO komuna al abonantaro de "Laŭte!" - Unua suplemento - Junio 1979.
**************************************

Novaj adresoj

FRANCIO

31200 TOULOUSE
+ Albault Odette
6 rue de Douaumont
- Cathala Gastounet
14 r. Ste Famille

31300 TOULOUSE
+ Albault Raphaëlle
14 av.Château d'Eau

33470 GUJAN MESTRAS
- Dubet Michel
Rue du Dr Dufourg
- Lavandier
Hôtel des Pyrénées

66000 PERPIGNAN
- Llech Walter René
72, av. Gal.de Gaulle

71700 TOURNUS
- Tomezzoli Lorenzo (43, matem.prof.)
La Garonne (*)

84000 AVIGNON
- Gente André
9 r.des Erables
t:(90) 82 29 03

92400 COURBEVOIE
- Masson Henri
82 rue du 22 Septembre

93800 EPINAY
- Cavalier Guy
1 pl.d'Oberursel

(*) tel. de Lorenzo Tomezzoli : 16(85)51 09 60

BELGIO

+ De Weerd Stella
Rubensheide 61
B 2080 KAPELLEN

GERMANIO

- Schut Kurt
Heresbachstr. 35
D 4230 WESEL

JAPANIO

- UNOKI takanori
Kyudensyataku 224
Sasi 3820, KARATU
847-01 Japanio

Ŝanĝi la adreson de:

- Patrick Chevin
66,rue Jean Jaurès
F 29200 BREST

- Laŭrenco Arroyo
A.L.T.I. - ch.3412
Le Bois de l'Etang
La Verrière
F 78320 LE MESNIL ST DENIS
(antaŭe en F 92000 NANTERRE)
t:16(1)043 81 37, poste 380.

Aldoni ĉe F 67100 :

Ĉar Ĵaklino Lépeix ne povos forlasi Strasburgon antaŭ (almenaŭ) septembro 1980, la propono pri gastigado validas ĝis tiu nova dato.
Kamaradoj, kiuj ŝatis la artikolon de kdo Faulhaver en la april-maja numero de SAT-Amikaro, estu informataj, ke restado ĉe Ĵaklino kostas neniom.

Novaj perantoj de "Laŭte!"(p.18)
*********************************

Britio : Kdo Neil BOTTOMLEY
230 Seaside Road
Aldbrough , HULL
E. Yorkshire HU 11 4 SA

Germanio : Kdo Gerhard KUNZE
Panoramastr. 25
D 7290 Freudenstadt 1
pĉ-kto: 41564-705 Stuttgart
Jara kotizo: DM 6.-

Regiona peranto en Francio :

* Bretonio : Klubo Esperanta Renna (KER)
4, résid. St Jean- Baptiste de la Salle, F 35000 RENNES
poŝtkonto: 391 45 W Rennes.

Bonvolu korekti :

Sur p.20, la adreso de la Laborista E-asocio en Tuluzo situas : 9 rue de la Cerdagne.